



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Novaj abonantoj de Pilo-Press
kiuj abonas por 1976 nun,
ricevas la restajn
numerojn de 1975
senpage!

Jara Abonkotizo

30,-- GM

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 32/75 26 aŭg 1975
Aperas ĉiusemajne

La rolo de lingvo kaj kulturo en politika subpremado TEJO-Seminario en Portugalio

Coimbra (pp) De la 5-a ĝis la 11-a de oktobro 1975 okazos sub aŭspicio de la beletra fakultato de la universitato de Coimbra kaj kunlabore kun portugalaĵ studentoj TEJO-seminario sub la temo "La rolo de lingvo kaj kulturo en politika subpremado". La seminario estas subtenata ankaŭ de la Eŭropa Junulara Fondaĵo. Laborlingvoj estas Esperanto, la angla, franca kaj portugala.

La partoprenkotizo estas 100 francaj frankoj.

El la programo:

Prof. Per Denez de la internacia unuiĝo de keltaj minoritatoj, prelegos pri la situacio en Bretonio kaj la liberiga movado tie.

Mauro La Torre, docento pri matematiko en Romo, parolos pri la "politika uzo de Lingvo".

Roman Dobrzyński, docento pri ĵurnalismo en Varsovio, informos pri kelkaj konkretaj ekzemploj por lingvaj aspektoj de politika subpremado

kaj aliaj diskutoj.

Informpetojn kaj aliĝilojn oni sendu al la Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO, Kastelenstraat 231, Amsterdam 1011, Nederlando.

Agronomio kaj malsato en la mondo

Pfaffenhofen invitas

Pfaffenhofen. (pp) Kiel ni jam informis, de la 5-a ĝis la 12-a de septembro 1975 okazos en la urbo Pfaffenhofen aŭtuna renkontiĝo de Germana Esperanto-Junularo pri la temo "Agronomio kaj malsato en la mondo."

El la programo: Prelegoj kaj diskutoj pri demografia eksplodo, faktoj pri malsato; Helpe per esplorado - tekniko - kemio - sterkado; nutraĵo el la maro; novaj manieroj por produkti manĝaĵojn; evoluhelpe; Germana agronomio - bavara agronomio - la nova agrarstrukturplano.

Krome okazas ekskursoj, vizito al bierfarejo kaj bieno, partopreno en polpolfesto, diservo kaj lumbildprelego.

Interesuloj sin turnu al Gustav Neumair, 8069 Scheyern, Winden 3, tel. 08445/430 aŭ al Bäckerei Schäch, Pfaffenhofen, Hohenwarter Straße.

Pilo-Press gratulas al

S-ro Felix Epstein, 2 Hamburg 20, Ludolfstr. 20, pro la 93a datreveno de sia naskiĝo!

Ges-roj Michael Paul kaj Keiko Miriam Zeilinger, 851 Fürth/B, Praterweg 10, pro la naskiĝo de dua infano, filineto Miriam Miwae, la 15.7.75

Niaj bardoj - turneo de pola muzikgrupo?

Münster (gb/pp) En Inowrocław dum la Internacia Junulara Esperanto-Feriado ili havis sian unuan prezentadon. Post unumonata verkado kaj ekzercado "Niaj Bardoj", grupo de kvin polaj muzikstudentoj rikoltis entuziasman aplaudon pro siaj kantoj. La kantoj estas verkitaj kaj aranĝitaj de la grupo laŭ poemoj de la hungara Esperanto-poeto Julio Baghy.

La pozitiva reago de la Inowrocława publiko kuraĝigis la germanajn ĉeestantojn inviti ilin al dusemajna turneo tra Federacia Respubliko.

La tempo interkonsentita estas la unuaj du semajnoj de januaro 1976. Dum tiu tempo ili prezentu sian kompletigitan programon en naŭ ĝis dek urboj. La grupo loĝu private ĉe esperantistoj, nelaste por malaltigi la kostojn de la tuta aranĝo.

Serĉataj estas urboj kun grandaj Esperanto-grupoj, privataj loĝeblecoj kaj disponebla salono (urba halo, lernejo, universitato). Bezonataj estas ankaŭ sugestoj, proponoj, konsiloj kaj rilatoj. Kiu kredas, ke li povas helpi estas petata informi:

Karl Trimborn, 4791 Paderborn-Elsen, Josefstr. 23

Aldona demando: Se iu posedanto de aŭtobuseto pretas ĝin disponigi por la transportoj kontraŭ kompenso konforma al la modestaj financaj rimedoj, tiu bonvolu kontakti la supre menciitan adreson.

Nova TEJO-estraro

Fredericia (pp) Dum la 31-a Internacia Junulara Kongreso en Fredericia, kun partoprenis 230 gejunuloj el 30 landoj, estis elektita nova TEJO-estraro:

Prezidantino: S-ino Claude Nourmont, Francio

Vicprezidantoj: S-roj Savas Tsiturides, Grekio, kaj Klaus Schubert, FRG

Sekretario: Bruno Casini, Italio

Kasisto: Paul Peeraerts, Belgio.

Radio-intervjuo kun Tibor Sekelj

Zagrebo(pp/mg) Radio Zagreb (Programo I) en populara marda elsendo "Kunveno en studio 8" aranĝis la 26-an de aŭgusto treege interesan intervjuon kun konata jugoslavia esploristo kaj esperantisto Tibor Sekelj. En unuhora intervjuo (inter 20-21 horo) Tibor Sekelj sukcesis ne sole skizi sian longan kaj multfoje tre streĉan vivovojon, sed kelkfoje menciis ankaŭ sian esperantistan aktivecon (li ekz. parolis pri siaj unuaj esperantistaj paŝoj en Zagrebo, pri mondmapo en Esperanto k.s.). Gratulon al Tibor Sekelj kaj la Radio!

8a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF)

Zagrebo (pp/mg) La jam tradicia PIF okazos jam la 8-an fojon, de 7 - 12 de oktobro ĉi-jare, en Zagrebo kun vizito ankaŭ de aliaj urboj en Jugoslavio. La festivalon partoprenos kaj donos programon pupistoj el Anglujo, Rumanio, Pollando, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Belgio kaj Jugoslavio. Inter la 13-14a de oktobro okazos en Zagrebo renkontiĝo de kroatiaj pupistoj el Zadar, Osijek, Rijeka, Split kaj Zagrebo.

ludos

Bertil Englund, sveda esperantisto kaj muzikisto, de la 1a ĝis la 30a de septembro en la kurorkestro de Bad Kissingen. Lia adreso: Bertil Englund, poste restante, D-873 Bad Kissingen.

Eŭropa Kolokvio

Saarbrücken (pp) Europa-Union, landa sekcio Saar, kunlabore kun Sarlanda Esperanto-Ligo, okazigos de la 20 - 21a de septembro kolokvion pri la "lingvoproblemo en Eŭropo" en Europäische Akademie Otzenhausen e.V. (Eŭropa Akademio).

Laŭ programo okazos jenaj referaĵoj:

Prof. Dr. Helmar Frank, universitato Paderborn
Klerigteknologiaj laboriloj de eŭropa lingvopolitiko

Prof. Dr. Ivo Lapenna, universitato London
La lingvoproblemo en la eŭropaj institucioj

Prof. Dr. Max Mangold, universitato Saarbrücken
Lingvistikaj konsideroj pri la ellernebleco de la lingvoj de la Eŭropa Komunumo kompare al la planlingvo Esperanto.

La kolokvion gvidos Günther Becker, Blieskastel, kaj Ernst-H. Wilm, de la Eŭropa Akademio.

Aliĝojn oni sendu al Europäische Akademie Otzenhausen e.V., D-6619 Otzenhausen/Saar.

Ĉeĥa lingvo taŭga kiel monda lingvo

Praha. - La ĉeĥa lingvo estas la plej taŭga por servi kiel monda lingvo. Al tiu konkludo venis la pola lingvisto Andrzej Suski post komparo de ok lingvoj. Suski opinias, ke la ĉeĥa lingvo estas tre taŭga pro siaj multaj silaboj sen vokaloj kaj siaj diversaj help-signoj super la literoj. Suski opinias, ke la germana lingvo estas la plej maltaŭga por monda lingvo.

La supra informo aperis en la nederlanda gazeto "De Nieuwe Krant", en sia eldono de la 75-08-29. Informis E.J. Woessink.

Esperanta originalo oficiale utiligita ĉe Eŭropaj Fervojoj

La dokumenta servo de la Germanaj Federaciaj Fervojoj (DB), kies sidejo troviĝas en Frankfurt/M 1, Karlstr. 4-6, kutimas dissendi al la aliaj eŭropaj fervoj-entreprenoj originalajn kaj tradukitajn tekstojn pri temoj, kiuj koncernas transportojn. Siavice, ankaŭ la aliaj fervojoj reciprokas la diskonigon de verkoj kun tia karaktero.

En marto 1975, Germanaj Federaciaj Fervojoj sendis al la Italaj Ŝtatfervojoj germanlingvan tradukon de artikolo originale verkita en Esperanto, aperinta en la numero 12/1974 de la revuo "El Popola Ĉinio". La frontispico de la oficiala publikaĵo, kiu ampleksas 8 paĝojn, diras: "Traduko/ ŭ 4166/ DK 625.111.004.12 (51)/Gju, Hinhua/ la nove konstruita Hunan-Gujĝou-a Fervojo/ El Popola Ĉinio (Pekino) (1974) Nr. 12, 6 B, esper./ ŭ 4166 (Böhm)/m 811". La klarigoj de la frontispico estas en la germana, sed la originala titolo de la tradukita artikolo estas en Esperanto. Oni ankaŭ indikas, ke la originala teksto estas en Esperanto. La artikolo estas akompanata de pluraj fotoj, eltiritaj el la revuo "El Popola Ĉinio", kun la originalaj klarigoj en Esperanto. La traduko ŝuldiĝas al Erwin Böhm.

Estas interese kaj grave, ke fervojo tiel altnivela kiel DB taksis menciinda, je internacia bazo, esperantlingvan artikolon. Oni povas aldoni, ke laŭplane recenzo pri la dirita traduko aperos en la aŭtuna numero de la presita bulteno de la italaj ŝtatfervojoj (FS), eldonata de ties dokumentara Servo. (Laŭ Esperanto-elsendo de Radio Roma).

Heroldo de Esperanto. Akurate je la 1a de septembro 1975 aperis la okpaĝa kongresa numero de Heroldo de Esperanto kun detalaj raportoĵ pri la 60a UK en Kopenhago.



Vortoj de d-ro Zamenhof:

"Se iu glornoma persono en plena nesciado de nia afero esprimas iun el tiuj sensencaĵoj, kiujn ni jam tiel ofte aŭdis....., tiam ni, esperantistoj, indiferece ĉion aŭskultas kaj trankvile iras nian vojon." (Parolado okaze de la Kvara Kongreso 1908 en Dresden /OV p. 387/)

Pri violono

Radio Vieno esploras

En sia elsendo de la 21/22 junio 1975 Radio Vieno disaŭdigis raporton pri la tirola violonfaristo Jakob Steiner. Tiu radia artikolo, originale verkita en Esperanto de d-ro Karl Beckmann, kaŭzis artikolon en la nordfrancaj ĵurnaloj "Nord Eclair" kaj "Nord Matin" de la 11a de julio 1975. La esperantlingva traduko de tiu artikolo tekstas:

"Leginte en via ĵurnalo artikolon pri la violono de s-ro A. Delebecque, redaktoro de Radio Vieno esploris pri la ebla origino de tiu instrumento, aĉetita antaŭ 15 jaroj en la brokanta foirejo de Roubaix. Ĉi-semajne la aŭstra radio disaŭdigis - du fojojn - raporton pri tiu temo, enkadre de Esperantlingva elsendo verkita de d-ro Karl Beckmann. Kiel ni jam priskribis, s-ro A. Delebecque trovis en la interno de sia violono etiketon kun la surskribo "Jokobus Steiner in Absam propre Oenipontum". Absam estas tirola vilaĝo, kie vivis la vilonfaristo Steiner. Jam kiam la majstro ankoraŭ vivis, oni ofte imitis liajn vilonojn kaj manskribon. Se la dato indikita sur la instrumento, kiun nia samcivitano posedas, estas 1680 aŭ 1683, la vilono estas eble aŭtentika. Se temas pri 1689 - tio estus ses jarojn post la morto de Steiner - ĝi estas falsaĵo. Ĉiukaze la problemo estas nur malfacile solvebla."